**ISSN: 0827-3154** **Revuo de Kanada Esperanto-Asocio**

2015/1 vintro/printempo 2015 https://www.facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the ***Lumo***.

# Lumo



Stevens (Steĉjo) Norvell (1923 - 2015)

Enhavo de la numero

Kolumnoj de la redaktoro 3

Novaĵoj de KEA 4

Stipendioj, raporteto 4
Alvoko al kandidatiĝo por la nova estraro 4
Financa jarraporto (2014) 5
Estrarkunsidoj 7

Anoncoj kaj artikoloj (ĉefe pri Kanado) 8

Nekrologo de Steĉjo Norvell 8
Meetup kaj Esperanto-konversacio por komencantoj en Toronto (Kathy Toy/Lunjo) 10
Nova klubo en Hamilton (Mateo Chisholm) 14
Nova mapo de Esperanto en Kanado (Mateo Chisholm) 15
Raporto de Reĝino (Bruce Arthur) 15
Memoraĵo pri Toronto (Trefleo Mercier) 16

Artikoloj, kontribuaĵoj kaj distraĵoj 18

Kurgaxiga mesaĝo de malsanulejo (Charles Donald) 18
Raporto de via UEA komitatano (Kopenhago, 2011) (Allan Simon) 20
Notetoj pri la 100a UK en Lille (Geoffrey Greatrex 22
Krucvortenigmo (kaj solvo de la antaŭa) (Don Reble) 24

**Limdato por la venonta numero :**
**31an de decembro 2015**
**Kontribuaĵojn oni sendu al :**
**greatrex@uottawa.ca**

Kolumnoj de la redaktoro

Reagoj feliĉe malabundis al la aperigo de la pasinta numero ĉefe en elektronika formato: ŝajne, mi do supozas, malmultaj ĉagreniĝis pro tiu evoluo. Espereble ĝi eĉ plaĉis al iuj! Evidente, mi volonte enmetos komentojn pri la afero, se mi ja ricevos iujn.

La ĉefa novaĵo lastatempe, almenaŭ por ni en la kanada movado, estas la forpaso de Steĉjo Norvell en januaro. Plenan nekrologon vi povos legi sube en ĉi tiu numero. Ĝin ĉefe verkis Steĉjo mem; mi ricevis ĝin subite en mia 'Dropbox' kesto, kie antaŭe ni komunikis kaj alŝutis versiojn de ĉi tiu revuo. Estis iom ŝoka konstato, kiam mi rimarkis la titolon de la lasta dokumento, kiun oni tie deponis. Theo Norvell, la filo de Steĉjo, bonkore ĝin tie metis, por ke mi povu dissendi la novaĵon; ankaŭ estis tipe organizita kaj bonintenca la fakto, ke Steĉjo jam ĉion ordigis antaŭ sia morto. Li multe mankos al ni; persone, mi dankemas, ke mi povis viziti lin antaŭ du jaroj en Novlando, kiam mi survojis al la UK en Islando.

Gratulojn al Mateo Chisholm, kiu unue ĝuste solvis la krucvortenigmon; ankaŭ al Ellen Eddy, kiu preskaŭ tuj poste sendis ĝustajn respondojn. Mi cetere rezignis pri daŭrigado de la belaj artikoloj de Ĵenja Amis pri Japanio, ĉar mi ne kapablus ilin pli lerte aŭ bone prezenti ol ŝi jam tion faras en la *Riverego*, kiun ĉiuj KEA-anoj povas legi en la reto.

Kontribuaĵojn ni ĉiam ricevas kun plezuro. Bv. sendi viajn artikolojn, raportojn, enigmojn k.s. al la redaktoro, antaŭ la fino de decembro 2015. Sed bv. noti, ke oni nun serĉas novan estraron (vidu p.4), kaj mi ja volas transdoni la redaktoran rolon al iu, kiu pli kompetentas pri nepaperaj revuoj ol mi. Jam relative longe mi redaktadas *Lumo*n, kaj evidente nun mi ne plu havas la helpon de Steĉjo - oportuna momento, ŝajnas al mi, por ke aliulo transprenu la taskon.

Retadreso : greatrex@uottawa.ca

Geoffrey Greatrex

La retejo de KEA estas la jena :

http://esperanto.ca/eo/kea

**Se vi ricevas paperan version de *Lumo*, tio signifas, ke ni ne havas retadreson (aŭ ke vi aparte tion petis) : en la unua okazo, bv. sendi vian retadreson al Ken Price (sekretario de KEA) kenprice13@sympatico.ca**

Novaĵoj pri KEA

**Stipendioj**

Lastatempe KEA strebis pli serioze okupiĝi pri subtenado de samideanoj en Kanado, kiuj volas serioze studi la lingvon kaj altigi sian lingvokapablon; iasence, ni tiel kunlaboras kun UEA kaj ĝia strategia plano por antaŭenigi nian kapabligan rolon, unu el la strategiaj celoj de la tegmenta organizaĵo. Tial la estraro de KEA decidis aljuĝi du stipendiojn de $1000 por partopreno en NASK en Norda Karolino en julio. La anoj de la instrua fondaĵo, kiu respondecas pri la disdono de stipendioj, decidis aljuĝi la stipendiojn al KEA-anoj Don McIntosh kaj Constance Koziej-Lévêque. KEA ankaŭ proponis tri stipendiojn de $300 por ĉeesto de gejunuloj je la komuna kongreso en Detrojto ĉi-jare; nur unu persono ricevis la stipendion, Steven Horvath. Oni cetere memoru ke ĉeestis la UK-on (kaj IJK-on) Kamila Koziej-Lévêque (maldekstre en la foto; apudas ŝin kartvelia kaj franca kongresanoj) kun helpo de KEA (kaj malavara donaco de Yves Bellefeuille).



**La deĵorperiodo de la nunaj estraranoj daŭras nur ĝis la fino de ĉi tiu jaro 2015**

Necesas trovi MINIMUME ses estraranojn por la sekva dujara periodo. Membroj de KEA rajtas proponi sin kiel kandidatojn, aŭ proponi alia(j)n membro(j)n kies konsento(j)n ili havigis. Por esti valida, sciigo pri kandidatigo devas atingi la sekretarion de KEA (Ken Price) antaŭ la fino de aŭgusto. Vi povas sendi la informon per letero aŭ retmesaĝo, aŭ persone transdoni ĝin. Lia retadreso estas sube.

Ne necesas esti jam sperta pri estrara laboro, sed oni devas esti preta partopreni diskutojn kaj doni sian opinion kiam propono estas farita. NECESAS tamen en la nuna epoko, ke estraranoj povu komuniki per RETPOŜTO. Ankaŭ estas dezirinde, ke ĉiu estarano povu uzi skajpon (Skype) por partopreni de tempo al tempo parolajn diskutojn kun la aliaj estraranoj.

Notu ankaŭ, ke por esti estrarano, aŭ por voĉdoni en KEA-elekto, oni devas esti membro de KEA. Kompreneble!

Do, se vi ne estas dumviva au honora membro, kaj ne memoras ĉu vi pagis kotizon por 2015, bonvole demandu al la sekretario aŭ la kasisto (Raymond Brisebois).

**Financa jarraporto**

La posteno de kasisto de KEA, kun la subteno de miaj kun-estrananoj, mi okupiĝas de post fru-2014, ricevinta ties oficaĵojn de eks-kasisto Yves Bellefeuille per glata transdono kaj daŭraj, helpoplenaj konsil-respondoj al miaj demandoj.

Mi do deziras raporti la jenon :

Bilanco komence de 2014 (raportita de Yves 'fine de 2013'):
[ĉiuj valutoj en kanadaj dolaroj, krom se notita alie]

AKTIVO

Banko 24394,61
Kontoj ĉe UEA 1333,27 (EUR 974,54)
Konto ĉe FEL 0,00
Libraro Ludovika 7340,00
Fondaĵo ĉe Victoria Foundation 46365,82
Librostoko 404,20
Ĉeko enkasigota 1347,00
Antaŭpagitaj elspezoj (poŝto) 5,48

Sume 81190,38

PASIVO

Kapitalo 42555,89
Rezervo dumvivaj membroj 35000,00
Rezervo prizorgo libraro 4754,10
Instrua fondaĵo 555,00
Perdo -1674,61

Sume 81190,38

Noto 1: En 2006, KEA starigis fondaĵon ĉe Victoria Foundation. Victoria Foundation tenas la kapitalon de tiu fondaĵo por KEA kaj investas ĝin; KEA rajtas ricevi la profiton, sed ne la kapitalon. Dum la jaro 2013, la rezulto de la fondaĵo estis +18,2%, aŭ gajno de $7352,40.
Noto 2: Pro emeritiĝo de la plur-jara respondeculo, Normand Fleury, la libroservo ĉesis funkcii en 2013. La tuta stoko estis rabatita je 50%; la stoko kiu poste restis (krom *La eta princo*) estis deskribita al simbola valoro de unu dolaro.

**Spezoj (2014)**

Enspezoj :

Kotizoj : $1,046.80
Donacoj : $1,104.26
Rentumo/Investaĵoj : $4,768.53
De rezervoj : $0.00
Kurzo-diferencoj : $171.59 ($25.88 de uson-dolaraj ensp. k $145.17 de eŭro-devenaj interŝanĝoj)
Libroservo (plejparte *La eta princo*) : $230.83

SUME : $7,322.01

Elspezoj :

Lumo : $375.36
Pago al UEA : $132.00
Estraraj kostoj : $1,002.53
Libroservo: $332.61
Oficisto : $1,000.00
Administraj : $648.88
Kanada Poŝtoficejo : $173.95
Revenu Québec : $109.86
Subvencioj: $2,795.18 (la tuto de subvencioj NASK-aj = $3,352.68; la Instrua Fondaĵo enhavis $555.00 je la fino de 2014 kaj KEA ankaŭ donace ricevis tiucele $2.50 dum 2014)
Bankokostoj : $0.00 (monata kotizo de $4.95 nuligita de samvalora rabato); neniaj aliaj kotizoj ĉi-jare;
Aliaj elspezoj: $0.00

SUME : $6,570.37

**Bilanco fine de 2014**

AKTIVO

Banko : $23,330.04
Kontoj ĉe UEA : keaa-f (KEA - ĝenerala konto) €899.54;
lkea-v (Libroserva konto) €50.00
valoro (la 31-an de decembro 2014 laŭ www.oanda.com) = $1,341.88.
Konto ĉe FEL : 0.00
Libraro Ludovika : $7,340.00
Fondaĵo ĉe Victoria Foundation : $49,284.84

Librostoko : $325.00 (*La eta princo* + $1.00 por la restanta stoko de la eksa Libroservo, notita tiel lastjare)

SUME : $81,621.76

PASIVO:

Kapitalo : $42,492.66
Rezervo dumvivaj membroj : $34,375.00 (55 dumvivaj membroj x $625.00)
Rezervo prizorgo libraro : $4,754.10
Instrua fondaĵo : $0.00 (donaco $2.50 dum 2014 - tiu fondaĵo plene disdonis sian monon samjare pro aprobitaj stipendioj NASK-rilataj)
Perdo - $63.23

SUME : $81,558.53

**Estrarkunsidoj**

Jam kunsidis ĉi-jare la estraro sesfoje per Skype (skajpo); lerte reĝisoras la kunsidojn Joel Amis, prezidas Paul Hopkins. En junio Paul Hopkins, Raymond Brisebois kaj estrarano Tamara Koziej povis kunveni kaj diskuti aferojn kadre de la komuna kongreso en Detrojto. Inter aliaj decidoj, oni daŭrigis la kontrakton kun Joel, kiu do daŭre laboros por KEA. Ni evidente estas dankemaj al li, pro lia vigla laboro.

Paul Hopkins atentigis pri la jena anonco:

Bonvolu ŝati la Facebook-paĝon de nia asocio:

https://www.facebook.com/KanadaEsperantoAsocio

Membroj kun Facebook-konto petu aliĝon al nia Facebook-grupo por ricevi novaĵojn pri la agado de nia asocio kaj decidojn de la estraro:

https://www.facebook.com/groups/kanada.esperanto.membroj/

**Stevens (Steĉjo) Norvell : Nekrologo**

Stevens (Steĉjo) Norvell mortis je la 7a de februaro 2015, nur kvar tagojn antaŭ sia 92a datreveno, post mallonga malsano.

Li naskiĝis en Usono je la 11a de februaro en la jaro 1923. Li estis la unua el tri infanoj de Stevens Norvell (inĝeniero) kaj Cora Kellam Norvell (instruistino). Li kaj du fratinoj plenkreskiĝis en Western Springs (en ŝtato Illinois), eta antaŭurbo de Chicago. Li frekventis publikajn lernejojn en la hejmvilaĝo kaj en la apuda urbeto, LaGrange. Pro la granda ekonomia depresio la familio estis iom malriĉa, sed la patro almenaŭ ĉiam havis laboron, kaj dank' al granda ĝardeno, estis ĉiam sufiĉe por manĝi.

En la adoleskaj jaroj, kiam skolto, Stevens renkontis Esperanton, aĉetis librojn, kaj lernis la lingvon meminstrue, tamen nur lege-skribe. Li jam studis la latinan kaj la germanan, kaj altiris lin la logika strukturo de Esperanto. Li ŝerc-diris, ke li fariĝis Esperantisto kiam li unuafoje vidis la tabelvortojn. Li komencis tutmonde korespondi; tamen unu el la plej fruaj korespondamikoj estis A. E. Regal, Bahaano kiu loĝis en fora antaŭurbo de Chicago. Steĉjo ĉiam sendis du kopiojn de ĉiu letero, unu por S-ro Regal kaj unu por korekti kaj resendi.

Bonŝance, li povis studi universitat-nivele dum du jaroj en la publika lernejo en la apuda urbeto. Estis milito, kaj li enskribiĝis en la armeo en jaro 1942, sed pro tio, ke li celis fariĝi kuracisto, oni permesis al li daŭrigi siajn studojn ĝis 1943. Poste, li estis trejnata kiel soldato kaj lernis 14 metodojn por murdi homojn — "iom senutila afero", li poste komentis. Post granda ekzameno, la armeo kaj la Medicina Fakultato de la Universitato de Illinois decidis, ke Stevens studu medicinon en Chicago. Fakte, tiutempe preskaŭ ĉiuj el la medicinaj studentoj estis en militist-uniformoj.

Stevens fariĝis refoje civitano en 1946 kaj daŭrigis la medicinajn studojn. Li estis elektita al AΩA, la honora medicina societo, en 1947. Li ricevis diplomon Doktoro de Medicino (kun honoroj) en 1947 kaj servis kiel enhospitala doktoro ĉe la Cook County Hospital (Malsanulejo de Kantono Cook) en Chicago ĝis junio 1948.

Li edzinigis Dorothy Dungan, kvakerinon, en kunveno de la Societo de Amikoj, en Downer's Grove, Illinois, en junio de 1948. La unua hejmo kune estis en Elk City (Alko-urbo) en ŝtato Oklahoma, kie Stevens laboris kiel famili-kuracisto en kooperativa kliniko kaj malsanulejo.

Post jaroj da trapensado, Stevens fariĝis pacifisto. Por eviti militservon en Koreio, Steĉjo kun sia edzino translokiĝis al Kanado en jaro 1950 (ili fariĝis civitanoj de Kanado en 1957). Li laboris kiel famili-kuracisto en eta vilaĝo en la enlandaj montoj de provinco Brita Kolombio ĝis 1953. Poste Steĉjo studis kaj trejnis dum ok jaroj en Edmonton (provinco Alberta) kaj en Colchester (Graflando Essex en Anglio) por fariĝi ĝenerala ĥirurgo, kaj bone sukcesis ĉiujn ekzamenojn.




Steĉjo je budo por propagandi Esperanton en Halifakso en 2006

En jaro 1961 la paro alvenis en Halifax (en kanada provinco Nov-Skotio), kune kun novnaskita filino, Cindy. La filo, Theodore, naskiĝis en Halifakso du jarojn poste. Stevens fariĝis instruisto en la Departemento de Ĥirurgio ĉe la Universitato Dalhousie, kie li laboris dum 32 jaroj kaj fariĝis Plena Profesoro. Dum tiu tempo li gvidis la junajn ĥirurgojn en la trejnado, okupiĝis pri ĝenerala ĥirurgio, urĝaj kazoj, kancero, kaj aparte pri la plej danĝera haŭtkancero, melanomo. Li esploris, aparte pri melanomo, kaj kontribuis 50 artikolojn al la scienca literaturo. Li kreis tutkanadan (entute, por 17 Fakultatoj de Medicino) ekzamenon por la junaj ĥirurgoj, kaj ankoraŭ ĉiujare la Norvell-premio estas aljuĝata al iu inter la superaj ekzamenitoj.

Iom antaŭ emeritiĝo, Stevens malkabeis al Esperanto. Li aliĝis al la Halifaksa Rondo kaj komencis ĉiusomere frekventi la famajn somerajn kursojn, fonditajn de Cathy Schulze, en San Francisko kaj Vermonto. Li provizis per domo la libraron de Harry Lewis kaj iompostiome pligrandigis la kolekton ĝis 2000 libroj, kiujn li finfine donacis al la Kanada Esperanto-Asocio. Li partoprenis en Universalaj Kongresoj en Kubo (1990), Norvegio (1991), Aŭstrio (1992), Hispanio (1993), Finnlando (1995), Ĉeĥio (1996), Aŭstralio (1997), Germanio (1999) kaj Kroatio (2001). Li prelegis pri Melanomo en la Internacia Kongresa Universitato en Vieno. Li vojaĝis en Euxropo per Esperanto kaj gastigis vojaĝantajn Esperantistojn en la propra domo. Li eldonis proksimume 150 artikolojn (poezio, ŝercoj, aktualaĵoj, sciencaj aferoj, ktp) en diversaj kanadaj kaj internaciaj periodaĵoj. Li helpis en la reviziado de la Plena Ilustrita Vortaro (sekcioj per ĥirurgio kaj medicino). Li redaktis la du medicinajn vortarojn de D-ro Yamazoe. Dum kelkaj jaroj li partoprenis en la redaktado de Medicina Internacia Revuo.

Li kompostis por *Inter Ni* (de la Halifaksa Rondo) kaj por *Lumo* (de Kanada Esperanto-Asocio). Li fariĝis honora membro de U.E.A., de la Kanada Esperanto-Asocio, kaj de la Esperanto-Rondo de Oradea (en Rumanio).

En jaro 2008, pro la aĝo, Steĉjo translokiĝis al la Atlantika insul-provinco, NovLando, por loĝi en apartamento en la domo de la filo, Theodore, lia partnero, Cheryl, kaj nepino, Saskia, en la urbo St John's. Tie li studis matematikon kaj daŭre verkis Esperante, kompostis Lumon, kaj korespondis. La komputilaj dosieroj atestas, ke li korespondadis kun Esperantistoj en pli ol 40 landoj.

Li postlasas filinon, Cindy, familian kuraciston en Kalifornio, genepojn Teo kaj Rhiannon, ambaŭ lernejanoj, kaj filon, Theodore, profesoron pri komputila inĝenierio ĉe Universitato Memorial en St John's, kaj nepinon, Saskia, ankaŭ lernejanon.

*NdlR: la nekrologon verkis Steĉjo mem, ĝustigetis Bob Williamon kaj mi mem. La paĝo de lia filo Theo je universitato Memorial aperigas kaj anglan version kaj esperantan, kun bela foto, je la jena adreso:*
http://www.engr.mun.ca/~theo/STNorvell-Obituary/ObituarySTNorvell-EN.html
*Malĝojiga kroma novaĵo estas ke la familion Norvell trafis la morto en julio 2015 en Kalifornio. Pereis pro vundoj liaj nepo Teo kaj bofilo Coleman Palmieri; sed, kvankam grave vunditaj, travivis la gefiloj Cindy kaj Theo, kiu tiutempe vizitis sian fratinon. Informojn oni trovos je:*
http://www.citynews.ca/2015/07/22/newfoundland-professor-stable-after-multiple-stabbings-at-california-home/

**Meetup kaj Esperanto-Konversacio por Komencantoj en Toronto**

Lastatempe la Esperanto-Rondo de Toronto komencis proponi renkontiĝojn nomatajn Esperanto-Konversacio por Komencantoj, kiuj, kompreneble, celas enkonduki lernantojn de Esperanto al verviva uzado de parolata Esperanto. Retumante, mi ofte legis komentojn de uzantoj de interretaj kursoj, ke ili timas kutimajn Esperanto-renkontiĝojn. Ĉu la fluparolantoj toleros homon, kiu tro hezitas kaj stumblas provante paroli Esperanton? Ĉu la lernanto povos defii sian propran timon paroli Esperanton en la nevirtuala mondo? Ĉu oni devas tute primajstri la lingvon antaŭ ol iri al Esperanto-renkontiĝo? Tio pensigis min pri la ideo starigi specialajn renkontiĝojn por komencantoj, en kiuj la nombro da fluparolantoj estas limigita al du aŭ tri, kies devo estas nur helpi la komencantojn paroli per malrapida kaj klara parolado kaj tuja respondado al demandoj.

Ekde la komenco en aprilo 2015 ni bonvenigis 17 komencantojn kaj rekomencantojn al ĉiusemajnaj renkontiĝoj. Per la retejo Meetup ni povis rapide kaj facile disvastigi la scion pri niaj renkontigoj al dekoj da diversaj homoj, aparte al universitataj studentoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Kelkaj jam komencis lerni per *Lernu!* au Duolingo, kaj serĉis precize la mildan etoson, kiun ni prezentas, por uzi sian novan scion kiel parolatan lingvon.

Anstataŭ tedi vin per longa klarigo mi decidis, ke la plej gravaj homoj en nia grupo (kiel ĉiam) estas la komencantoj mem, do mi petis atestojn de kelkaj el ili. Jen la rezulto:

Zac

‘Mi treege ĝuis la pasintajn Meetup renkontiĝojn pro diversaj kialoj, sed la plej bona parto de la renkontiĝoj estis simple havi la ŝancon aŭdi “ĝustan” prononcon kaj aldoni novajn vortojn al mia vortstoko. Mi estas tre dankema pro la membroj de la grupo, kaj la renkontiĝoj kuraĝigis min studi kaj reveni al la venonta Meetup.’

MJ

‘Mi estas novveninto al Esperanto, sed mi havas grandajn esperojn! Dum mia antaŭa sperto lerni novan lingvon (la anglan, en la 10a klaso) tio, kiu funkciis por mi, estis kombinaĵo de ĉiutaga studado kaj sufiĉan dozon da plentempa aŭskultado kaj ekzerca parolado.

Nun, kiam mi firme decidis lerni Esperanton, mi prizorgis miajn studbezonojn per la novlanĉita Duolingo-kurso (komence), sed mi ankaŭ devis aldoni al la studado per vermondaj interagoj.

Mi malprecize memoris el antaŭ kelkaj jaroj, ke Toronto havas Esperanto-klubon kun regulaj ĉeestantoj, sed mi raviĝis malkovri, ke ili troviĝas ĉe la populara retejo Meetup.com, de kiu mi jam estis membro! La steloj ordiĝis tiel perfekte por mi. Ili ne nur havis regule okazantajn renkontiĝojn, sed ili ankaŭ okazis en apartaj socia kaj porkomencanta serioj, kun ĉiu renkontiĝo okazanta ĉiusemajne!

Mi estis tre feliĉa pri la ofto kaj reguleco de tiaj renkontiĝoj, kaj aparte ekscitita vidi kiel la porkomencantaj renkontiĝoj iros. Kompreneble, kiam mia Esperanto pliboniĝos iom pli, mi esperas ankaŭ ĉeesti la sociajn kunvenojn. Oni ne nuligis miajn esperojn!



Mateo Chisholm (en la mezo) kun kelkaj komencantoj

Dum miaj unuaj sep renkontiĝoj mi renkontis grupon da mirindaj Esperantistoj, kies fokuso celis bonvenigi novalvenintojn al la komunumo, respondante niajn bazajn demandojn kun senlima pacienco, milde puŝetante nin provi paroli kiujn ajn kelkajn vortojn da Esperanto, kiujn ni lernis ĝis tiam, kaj

parolante kun ni klare kaj malrapide por helpi nin ekzerci nin ankaŭ en aŭskultado.

Mi renkontiĝis kun Mateo, Tiffany, Ryan, Ken, Detlef, kaj Lunjo — ĉiuj altgradaj Esperantistoj — kiuj estas tie por helpi bonvenigi novvenantojn en la mirindan mondon de Esperanto!

Lunjo, kiun mi adoras, estas aparte entuziasma pri helpado al la novvenantoj, kaj ŝi lerte sukcesas eltiri min de iu ajn ŝajna ŝelo ĉiun semajnon, por ke mi povu engaĝiĝi en komencanto-nivelaj konversacioj kun ŝi kaj la ceteraj ĉeestantoj. Ŝia entuziasmo estas infekta, kaj kiam ajn mi forlasas ĉi tiujn renkontigojn, mi ĉiam tiel ekscitiĝas reiri al lernado, por ke mi povu konversacii eĉ pli en Esperanto la venontan fojon!

Mateo kaj Ryan estas aparte helpemaj pri Telegram — portebla babilmesaĝilo, per kiu grupo da Torontanoj sociumas, kie ili respondis multajn el miaj novicaj demandoj kun pacienco kaj kuraĝigado! La ideo de specifa kreado de komencanto-serion ŝajne resonadas bone al novvenantoj kiel mi kaj iu de la aliaj mi renkontis dum la lastaj kelkaj semajnoj kiuj eble sentus sin memkonsciaj pri ĉeesto al renkontigoj por fluaj Esperantistoj.

Komencantoj dividas konsilojn pri lernado kaj parolas unu al la alia sub la gvido de niaj lertaj gastigantoj kaj estas logitaj al konversacio en Esperanto per observo de aliaj novvenantoj kiuj ankaŭ provas kaj triumfas.



Ĉi tiu tempoperiodo estas ekscitiga, kaj mi ĝojas pri vivado en Toronto kie mi havas alirkapablon al bonega grupo de homoj, kiuj volonte helpas al aliaj kaj disvastigas la entuziasmon, kiun la Esperanto-movado meritas! Mi esperas, iun tagon, repagi ŝiajn malaverecon kaj proponi la samon al futuraj novalvenontoj!’

Kirby

‘La “Esperanto Konversacio por Komencantoj” renkontiĝoj estas nekalkuleble valora fonto pri lernado de la lingvo. Ĝi estas amikema kaj malstreĉa etoso por mi en kiu mi povas ekzerci min pri parolado de Esperanto. Mi neniam estas sentigita malinteligenta au nebonvenigita, kaj mi ĉiam eliras de ĉiu kunveno ne nur kun kelkaj novaj vortoj kaj gramatikaj konceptoj enkapigitaj sed kun la instigo daŭre paroli la lingvon. La konversaciaj temoj etendiĝas de anekdotoj al nuntempaj okazoj en la vivoj de homoj al Esperanto-kulturo.

Entute, mi ne kapablas paroli sufice laŭde pri tio, kion ĉi tiuj renkontiĝoj faris por mi dum mia lingvolernada vojago. Krom ĉio supre, ekzistas aldonita bonuso pri la renkontiĝado al novaj interesaj kaj ĝentilaj homoj, kun kiuj mi ne havis la ŝancon renkontiĝi kaj interparoli sen tiuj

renkontiĝoj.'

Nima

'Kvankam mi sciis pri Esperanto dum longa tempo, mi interesiĝis pri ĝia lernado per la "Esperanto Konversacio por Komencantoj" grupo antaŭ pli malpli unu monato. Mi progresis de tuta komencanto al altnivela komencanto ĝis nun. Per ĉeesto al la renkontiĝoj, oni havas la eblecon ekzerci sian parolkapablon kun iu, kiu estas je la sama nivelo. Amikecaj homoj troviĝas tie! Mi ankaŭ finis perkomputilan kurson* virtuale gvidita de unu el la organizantoj de ĉi tiu grupo, Detlef, al kiu mi estas ege dankema.

*Free Esperanto Course http://pacujo.net/esperanto/course/

Raven

Mi komencis iri al la EKK renkontiĝoj post ĉeesto al la Mez-Kanada Renkontigo en Majo. Kvankam mi jam lernis Esperanton dum periodo, ĉe MeKaRo estis la unua fojo kiam mi parolis kun aliaj Esperantistoj. Do mi estis sufiĉe nervoza je la komenco. Kion mi diru? Ĉu mi prononcas vortojn ĝuste? Ĉu tiu frazo estis gramatike ĝusta? Kiel, do, mi divenu la akuzativon kiam mi parolas laŭte kaj ne povas relegi la frazon kiun mi ĵus tajpis?

Ĉiuj en la grupo estas tre helpaj, kuraĝigas min reordigi frazojn uzante la malgrandan vortstokon mi havas, kaj strukturigas bonan ekvilibron inter ŝancoj provi (kaj malsukcesi!) babili kaj permesi al mi aŭskulti konversaciojn inter la pli lertaj parolantoj. Mi estas iom malĝentila ĉar mi daŭre interrompas homojn, demandante "Kion signifias tiu vorto?", sed neniu kontraŭas tion. Ĉiuj estas tre entuziasmaj kaj amikemaj, kaj tiu helpegas min senti pli da memfido kiam mi parolas.

Tra la semajnoj dum kiuj mi ĉeestis EKK, mi sentas, ke mia kapablo en Esperanto ege pliboniĝis. Mi revenos hejmen al Irlando je la fino de la somero, kaj tiam, mi certe enketos ĉu ekzistas simila renkontiĝo por komencantoj en mia regiono.'

Trevor

'Ni havas interesan aron da homoj en nia grupo. Mi ne anticipis trovi aliajn multlingvanojn, do tio estis agrabla surprizo. Ĉi tiu grupo donas al mi bonan ŝancon ekzerci min pri miaj parollertoj, neniam antaŭ ĉi tiu tempo parolinte Esperanton kun iu ajn. Renkonti je kafejo estas logika loko, kaj la loko estas facile atingebla per publika transporto.

Mi estas feliĉa, ke mi priserĉis ĉi tion!'

Nu, oni povas konstati, ke ĉi tiu instigo sufiĉe bone sukcesis, kaj nia klubo baldaŭ planas la estontecon de la aranĝo post la somero. Ni jam adoptis Meetup kiel la ĉefan informejon por niaj

renkontiĝoj. Se via klubo havas la financan rimedon kaj la emon ankaŭ adopti tion, mi fervore rekomendas ĝin, aparte se via klubo troviĝas en universitato-urbo, sed ne nur. Meetup estas mondskala organizo, kaj ni jam bonvenigis vizitanton de Germanio, kiu trovis nian klubon per Meetup. (Estas senkoste aliĝi kiel individuo de Meetup sed estas kotizo por persono aŭ grupoj kiuj volas starigi anoncpaĝojn.)

Intertempe, kiel aldonita paŝo por niaj komencantoj, ni aranĝas Somerfeston 2015 kiel specialan renkontiĝon por la tuta Esperantistaro en nia regiono (kaj aliaj vizitontoj) bonvenigi la komencantojn al pli kutima kluba renkontiĝo. Ni planas muzikon, ludojn, konversaciojn en kiuj la komencantoj povos pli facile partopreni, kaj la tuta klubanaro tiam agos kiel helpantoj al la novparolantoj.

Mi esperas, ke tiu artikolo instigos vin priserĉi la eblecon starigi vian propran "Esperanto-Konversacio por Komencantoj" kaj Meetup paĝon. Se oni havas demandojn, mi volonte respondos per retpoŝto. Intertempe, vizitu nian paĝon je

www.meetup.com/Esperanto-Toronto kaj planu veni al Toronto por Somerfesto 2015!

Lunjo kathytoy@rogers.com

(Dankegon al Tiffany, Ryan kaj Mateo kiuj estas la ĉefaj kunhelpantoj pri niaj EKK arangoj)

**Nova klubo en Hamiltono**

La plej nova Esperanto-klubo de Kanado, Esperanto-Hamilton, okazigos sian unuan kunvenon ĵaŭdon, la 24an de Septembro 2015 je 18:00, ĉe Williams Fresh Cafe, 37 Discovery Drive. Ĉi tiu kunveno estas malferma al tiuj, kiuj interesiĝas lerni Esperanton, tiuj, kiuj jam iom konas ĝin, kaj fluparolantaj Esperantistoj. Sentu vin libera inviti iujn ajn amikojn, kiuj ankaŭ eble interesiĝus.

Ĉi tiu grupo estas branĉo de la Esperanto-Rondo de Toronto, ankaŭ konata kiel Esperanto-Toronto. Ni tre ekscitiĝas povi ekspansii al Hamiltono. Por pliaj informoj, bonvolu kontroli la grupon Esperanto-Hamilton en Meetup ĉe


http://www.meetup.com/Esperanto-Hamilton/

Matthew/Mateo Chisholm

**Nova mapo de Esperanto en Kanado**

Jen nova mapo de Esperanto-organizajoj kaj Esperantistoj en Kanado:

https://www.google.com/maps/d/viewer?mid=zT6LkdvbQrUw.keeeEnP6uCAw




Ĝi utilas por trovi homojn proksime, por viziti dum vojaĝoj, se ili havas tempon, aŭ por simple montri, ke ni ne malmultas kaj konstante kreskas!

Se vi volas surmapigi vin, bonvolu plenigi la formularon. Por ĝisdatigi/korekti/forigi informojn, sugesti, k.t.p., sendu mesaĝon al la mapa administranto: mateo416+mapo@gmail.com

Matthew/Mateo Chisholm

**Raporto de Reĝino, Saskaĉevano**

La Esperanto-Rondo de Reĝino kunsidas regule por ekzerci pri uzado de Esperanto. Sed ni estis konsternige skuitaj de la morto de unu el niaj tri membroj en februaro. Temis pri Leo, kiu gravis kiel membro kaj kiel amiko. Leo parolis Esperanton sufiĉe bone, do ni povis ekzerci pri parolado inter ni. Li ankaŭ ĝuis interŝanĝi kaj legi revuojn. Li interesiĝis pri multaj aferoj, kaj ni nepre ĝuis paroli (eĉ krokodile) kun li. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, li donacis multe da sia tempo kaj energio al la Specialaj Olimpiaj Ludoj. Li pensis, ke tio estas bonfara movado, sed ankaŭ, ke li mem lernis multe de la atletoj. Leo ankaŭ lernis kaj amis la francan lingvon (kaj kelkfoje ŝercis ke nia rondo uzu la francan anstataŭ Esperanton). Li laboris kiel veldisto, sed kelkajn monatojn antaŭ sia morto, li trovis novan laboron ĉe la polica muzeo kaj trejnejo, kaj diris, ke tiu laboro plaĉis al li multe pli bone. Leo estis sportemulo kaj patroprenis multajn maratonojn. Li ĉiam biciklis, dirante, ke tiel li ŝparis monon. Li ankaŭ estis bona pentristo. Li postlasis amatinon kaj filinon.

La du restantaj membroj de nia rondo konsistas el unu parolanto kaj unu lernanto. Dum niaj

kunsidoj, ni ofte legas revuan artikolon por ekzerci. Ni ankaŭ interŝanĝas leterojn kun aliaj rondoj kaj ni interesiĝas lerni pri ili. Unu el ĉi tiuj korespondaĵoj estis Matthew Chisholm de Toronto, kiu proponis krei retpaĝon por ni. Ĉi tiu retpaĝo nun funkcias, kaj ni esperas, ke tio kondukos novajn membrojn al ni.

Bruce Arthur

**Memoraĵoj pri Toronto**

Mia partoprenado en la tre sukcesa lasta eldono de la Mezkanada Esperanto-Renkontiĝo (Mekaro) en Toronto estis okazo memori pri alia simila evento en tiu interesa urbo, nome la 10a Kanada Kongreso de Esperanto okazinta 47 jarojn pli frue, en 1968. Ĉar mi ne partoprenis la antaŭajn Mekarojn en Toronto en 2005 kaj 2009, fakte estis okazo pensi pri konatuloj kun kiuj mi ĝuis tiun renkonton. Kiam mi rigardas la vizaĝojn de tiu 10a kongreso, estas eble nur du aŭ tri kiuj postvivas aŭ pri kiuj oni daŭre aŭdas; temas pri Ken Price, Duncan Charters kaj mi.

Mi pensis, ke estus interese dividi kelkajn bildojn pri tiu pasinta evento kun la legantoj de Lumo por montri ke la movado estis sufiĉe vigla en la 60aj jaroj por okazigi oftajn landajn kongresojn.



La grupa foto montras kelk46 partoprenintojn. Oni rekonas inter alie: Guy Parrot, Vincent Beaupré, Trefflé Mercier, Paul Ronald, Agnes Nii, Rosemarie Tuch, M. Kung,  iun S-inon McKinnon, Sara Hazen (la blindulino), Jerzy Jarmasz, Brian MacClafferty; kaj sidantajn sur la planko: Kriss Smilga (iama redaktoro de Lumo), V. Dersola, Lorcan O hUiginn (iama prezidanto de KEA), Dez Hackett (toronta aktivulo), Ken Price, Duncan Charters, Vladislavo Zygmuntowicz.



10a Kanada Kongreso de Esperanto
[Teasdale, sekretariino; G. Clavet,
A; Francisko De Kinder, vicprezidanto

abe): Duncan Charters, Brian
Deacove kaj Vincent Beaupré.





58 Centra Insulo
onto ankaŭ
homojn por
la belan
an veteron: Frato
arrot, J.
ursky, Kajmo
Lilianne
e, Nicole
ale, M. J.
nare kaj G.
Clavet.



Aliaj kongresanoj gaje babilantaj: Brian MacClafferty, Jim Deacove, L. Bergson, M. Kung kaj Walter Murawski el Usonono (dekstre).
Kadre de la 10a Kongreso de



KEA en 1968, la Centra Insulo de Toronto gastigis ses Ŝerbrukanojn: Trefflé Mercier, Françoise Vallée, Onil Noël, Monique Turgeon, Madeleine Turgeon kaj Richard Mercure. Krome videblas sur la foto: Frank De Kinder kaj Susan Husband.


Specialan dankon al Ken Price pro fotoj kaj helpo pri nomoj.

Trefflé (Trefleo) Mercier

Artikoloj, Kontribuaĵoj kaj Distraĵoj

**Kuraĝiga mesaĝo de malsanulejo**

*NdlR: oni ricevis ĉi tiun artikolon antaŭ kelkaj jaroj, sed pro pluraj kialoj oni ne povis ĝin eldoni ĝis nun. S-ro Donald honoriĝis lastjare de UEA pro kvindek sinsekvaj jaroj de membreco.*




La aŭtoro, Charles Donald

Kial oni daŭre stumblas en la mallumo de lingva nekompreno? En 1887 el la centro de Euxropo brilis lingva lumego de la plumo de juna polo, Ludoviko Zamenhof, sed homoj fermis la okulojn dezirante konservi siajn antaŭjuĝojn kaj politikan malscion. Ĉi tio estas tipa, ĉar okazis antaŭe kiam venis La Lumo de La Mondo, Jesuo Kristo. Mi volas rakonti kiel mi trovis la lingvon dum mia vivo.

Mi naskiĝis en Skotlando en la jaro 1942. En la lernejo mi luktadis kontraŭ lingvoj, la angla, franca, sen sukceso. Tiam mi aŭdis pri la Internacia Lingvo Esperanto, spektante televidan novaĵ-programon, kie estis esperantisto de la Brita Esperanto-Asocio, kiu intervuis alteriĝintojn ĉe flughaveno Heathrow en Londono, por eltrovi kiom da vojaĝantoj konas la lingvon Esperanton kaj uzas ĝin dumvojaĝe.

En marto 1959 mi iĝis diabetulo dum mi spertis la premon de finaj ekzamenoj en la lernejo. Tiu malsano kun la injekto de insulino regos mian vivon, limigante tion, kion mi faras kiel plenkreskulo. Mi decidiĝis pri sida okupo, kiu donos tempon por studi inĝenieran profesion kaj ellerni ankaŭ la lingvon Esperanton. Laborante en Londono kelkajn jarojn mi renkontis multajn alilandajn gesamideanojn. Por plibonigi la parolon, mi amikiĝis kun du anglaj junuloj kaj ni kutime renkontiĝis preskaŭ ĉiun semajnfinon.

En la jaro 1967 pro la milito en Israelo la Universala Kongreso alilokiĝis de Tel-Avivo al Roterdamo. Ankoraŭ vivante en Londono, ni tri amikoj kaptis la okazon viziti la nederlandan komerc-urbon. Tio estis mia unua vizito al Euxropo. La pureco de la urbego kaj la trajnservo impresis min. Konante iomete la germanan lingvon mi emis uzi ĝin, sed iu avertis min : 'Ne uzu ĝin pro tio, kio okazis en Nederlando dum la milito; mi uzu la anglan.' Denove milito okazis en la mezoriento, sed homoj divers-naciaj allogiĝis al la iam detruita urbego kaj ĉeestantoj amikiĝis. Tie ĉi brilis la lumo de amikeco, sed mezoriente homoj vivis kaj mortis en mallumo. Vivu Esperanto!

La lingvo ankoraŭ vivas en Kanado. Tion mi eltrovis kiam mi estis en kalgaria malsanulejo, Peter Lougheed Centre. Mi estas novulo en la urbego alveninte de Reĝino (angle: Regina), kie mi loĝis dum 35 jaroj post la alveno el Skotlando. Pro malalta sang-sukero mi falis kaj rompis denove la maldrekstran humeron. La kuracisto el la departemento de la malsanulejo por la krizaj kazoj elkovris ankaŭ infekcion en la urinsako, kiu rompis mian kontrolon je la sang-sukera nivelo. Nun mia ĉambro estas en la kvara etaĝo de la nova portempa loĝejo, en kiu estas pacientoj atendantaj transiron. Mi estas novulo en Kalgario, kiu konas neniun personon krom miajn familianojn, tio estas, miaj gefiloj kaj iliaj infanoj. Mi ricevis la nomon kaj telefonnumeron de esperantisto el Kalgario de filipina voluntulino, al kiu mi prezentis la lingvon antaŭe dum ŝia vizito al mi. Telefone al la sekretario de la klubo, Milan Sveda donis al mi kelkajn gazetojn kaj La Novan Testamenton, por ke mi legu. Afable, li invitis min al la kluba kunveno ĉe loka kafejo la sekvan lundon por trinki tie kaj babili kun aliaj ĉeestantaj esperantistoj.

La laboristoj de la malsanulejo estis plenhelpaj. Mi menciu kuraciston ĉarman. Ni amikiĝis per kono de la diabeta terminologio. Facila komunikado estis bona rilate al ŝanĝo je kiom da insulino mi ricevu. S-ro Marko prizorgas la bezonojn de ĉiuj. Li rolas kiel filipina fleghelpanto ĉiam ridetante. Maria, kiu sidis ĉe la enirejo de la ĉambraro, scias pri la lingvo kaj miras pri mia lerteco lingva.

La brileco de la lingvo kreita en Polujo daŭre kaptas la atenton de interesuloj, kiuj interesiĝas pri la lingva kompreno.

Charles Donald

**Raporto de via UEA-komitatano (pri la 96a UK en Kopenhago, 2011)**

*NdlR: denove, ĉi tiu artikolo jam longe kuŝis ĉe redaktoro(j) de* Lumo*, kaj evidente devintus aperi antaŭ jaroj. Ni pardonpetas pro la malfruego; la artikolo daŭre meritas eldonon, ni*

*opinias, ĉar pluraj punktoj daŭre aktualas.*

*Kio estas la komitato de UEA?*

Pasintan jaron (2010) mi fariĝis la Kanada komitatano ĉe UEA. Ĉi-postene mi deĵoros dum trijara periodo. Mi supozas, ke multaj membroj ne precize scias kion faras komitatano. (Fakte mi mem ne sciis kiam mi kandidatiĝis!)

La komitato de UEA estas la plej supera organizo de UEA. Ĝi elektas la prezidanton kaj la aliajn estraranojn. Ĝi rekomendas, kaj fakte rajtas ordoni, al la estraro kaj al la stabo de la Centra Oficejo en Roterdamo, kion fari. La komitato kunvenas ĉiun jaron dum la Universala Kongreso por elektoj kaj aliaj gravaj decidoj. Cetere, ĝi kreis por si interretan diskutrondon kie ĝi pridiskutas diversajn temojn, ekzemple pri asociaj strukturoj, varbkampanjoj, aŭ financaj aspektoj. (*NdlR: nun eblas ankaŭ voĉdoni perrete*).

Memkompreble komitatanoj ricevas nenian financan apogon de UEA. Ni devas pagi niajn proprajn vojaĝkostojn - nia sola financa rekompenso estas iom malpli alta kongreskotizo, ĉar ofte ni devas kunsidi anstataŭ partopreni la kongresajn aranĝojn. La komitato nun konsistas el 61 membroj. Ĉiu lando kun minimume 100 UEA-membroj rajtas elekti unu komitatanon. Tiujn ĉi komitatanojn oni nomas komitatanojn A. La malpli grandaj asocioj rajtas nomumi nur observanton, kiu partoprenas la diskutojn sed ne rajtas voĉdoni. Krome, la individuoj membroj de UEA elektas kelkajn eminentajn individuojn, la tielnomatajn komitatanojn B. Tiuj ĉi komitatanoj reprezentas ne sian landon aŭ sian asocion, sed sin mem. Fine, la komitatanoj A kaj B rajtas elekti individuojn kun specialaj spertoj, la tiel nomatajn komitatanojn C.



La estraro de UEA (surpodie) antaŭ la komitato dum la 100a UK en Lillo, 2015

Inter la 61 komitatanoj, Kanado havas tri: mi mem, Mark Fettes (komitatano B) kaj Jean Codjo (komitatano C). Tio estas sufiĉe rimarkinda, ĉar krome nur Francio, Ĉinio, Belgio kaj Hungario povas vanti pri tri komitatanoj. Nederlando havas eĉ kvar! Multaj grandaj landoj kiel Usono, Britio kaj Rusio havas nur unu komitatanon. Ni Kanadanoj tamen devas esti singardaj, ĉar ni alproksimiĝas la suban limon de 100 membroj. Minacas nin la sorto de Sudafriko, Nov-Zelando kaj Irlando, t.e. havi nur observanton.

*Kion faras UEA?*

La plej gravaj taskoj de UEA estas informado, edukado kaj eksteraj rilatoj. La evoluigo de la movado kaj nia bildo en la ekstera mondo ankaŭ dependas de UEA. Krome, UEA organizas la Universalan Kongreson, kaj ĝi eldonas la revuon *Esperanto* kaj aliajn publikaĵojn.
UEA plenumas ĉi tiujn taskojn per helpo de naŭkapa skipo (*NdlR, nun malpli*) kiu laboras en la Centra Oficejo en Roterdamo, kaj kompreneble per la helpo de sennombraj voluntuloj ĉie en la mondo.

*Kiel aspektas la financoj de UEA?*

La elspezoj de UEA en 2009 estis entute 460,000 euxroj; la plej altkostan elspezeron reprezentis la salajroj de la dungitoj: 245,000 euxroj. Oni povas facile kalkuli ke la dungitoj estas malbone pagitaj, speciale por Nederlando, kiu ja estas sufiĉe altkosta lando. Por la enspezoj, UEA kalkulas ĉefe je kotizoj (€ 244,000), la rento de diversaj fondaĵoj (€ 85,000), la UK-kotizoj (€70,000) kaj eta profito de la libroservo.

*Kial vi fariĝu individua membro de UEA*

La jarkotizo estas 34 kanadaj dolaroj (nun 35). Pro tiu kotizo oni ricevas kaj jarlibron kaj la retan version de la ĉiumonata revuo Esperanto. Se oni preferas ricevi la paperan version de la revuo perpoŝte, la kotizo estas $85 (nun 88). Sed kalkulu ne nur vian personan avantaĝon. UEA povas atingi siajn celojn nur pere de la kotizoj kaj donacoj de ordinaraj esperantistoj. Ĝenerale, ni esperantistoj estas donacemaj kiam temas pri nia idealo - do mi petas vin, bonvolu fariĝi individual membro de UEA!

Jen alia stimulilo: ĉiun neparan jaron (2009, 2011, ktp.) UEA aljuĝas la Trofeon Fyne. Tiun trofeon donacis la Kanadanoj Adam kaj Erica Fyne. La trofeon ricevas la landa asocio en kies lando okazis la plej granda kresko de individuaj membroj. Ĝis nun, en la 35-jara historio de la Trofeo, KEA neniam gajnis! Ĉu ne estas la tempo por transporti hejmen 'nian' trofeon, almenaŭ dum du jaroj? Se nur 50 el niaj legantoj respondus al nia alvoko, ni kredeble gajnus!

*Kiel fariĝi individua membro de UEA?*

La plej simpla metodo estas pagi pere de la kanada UEA-peranto. Iru unue al la retpaĝo http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php . Elektu vian preferantan membrokategorion kaj plenigu kaj printu la aliĝilon. Sendu tiun aliĝilon kune kun ĉeko pagebla al Universala Esperanto-Asocio al:

Olga du Temple
765 Braemar Avenue
North Saanich BC
V8L 5G5

Allan Simon

**Notetoj pri la 100a UK de UEA, Lillo, Francio, 25a de julio 2015 - 1a de aŭgusto**




Sekvos en posta(j) numero(j) de *Lumo* aliaj pli ampleksaj raportoj pri la UK. Sed dumtempe mi proponas kelkajn komentojn pri la ĵus-okazinta kongreso. Partoprenis pli ol 2600 homoj el proksimume 80 landoj: precizajn ciferojn oni legos aliloke.

El kanada perspektivo, notendas unue ke oni relative multnombris, kiel oni eble atendus je jubilea kongreso. Estis plezuro por mi revidi plurajn aktivulojn en KEA, i.a. Ken Price, Allan Simon, Yves Bellefeuille, sed ankaŭ konatiĝi kun relative freŝbakitaj samideanoj el nia lando, kiel Kamila Koziej kaj Tiffany Antopolski, kiuj ambaŭ poste iris al Wiesbaden por la IJK. Mi iom hontetas, ĉar oni metis mian nomon sub la lando Britio en la kongresa libro: temas pri fuŝaĵo de UEA, ĉar mi pasigis kelkajn monatojn tie tuj antaŭ la kongreso.



Pluraj aspektoj meritas laŭdon. La organizantoj bele zorgis pri la videbleco de la kongreso: ĉie en la urbo abundis profesiaspektaj reklamiloj pri la evento (vidu supre); koncertoj okazis en la ĉefa placo; kursojn oni proponis al interesatoj - laŭdire, pli ol 100 homoj venis por partopreni fulmrapidan kurson; la distraĵoj estis multnombraj kaj interesaj. Aparte riĉa estis la teatra programo: ludis ĉefe francaj trupoj, sed itala trupo ankaŭ prezentis interesan verkon dulingvan (itale kaj esperante) pri la sorto de enmigrantoj.




La kongresejo mem ne belis, necesas agnoski (la apuda bildo montras ĝin dum relative malofta suna vetero), sed ĝi troviĝis en oportuna loko. Interne, la strukturo ne imponis; kaj la decido uzi la ĉefan halon, en kiu babilis homoj, por konstantaj koncertoj ne tre trafis. Estis ja bele povi profiti de konstantaj kulturaĵoj (kantado, dancado ktp.), sed la akustiko tre malbonis kaj la sono iom ĝenis kunsidojn en aliaj ĉambroj. Viglis la kongresa universitato; prelegis, inter aliaj, Bill Mack, kiu nun loĝas en Japanio, sed ja estas kanadano.

Alia raportendaĵo koncernas la partoprenon de Marjorie Boulton en la kongreso, kiel certe estus dezirinta Steĉjo Norvell: en la bildo ŝi sidas centre inter Humphrey Tonkin kaj Sally Phillips (el Britio). Notindas aldone, ke oni nomis ĉambron laŭ Steĉjo en la kongresejo. Alparolis la kongreson cetere Louis Zaleski-Zamehof, kiu ankaŭ aĝas 91 jarojn. Salutis ĝin nome de Kanado Joel Amis, kiu lerte kaptis la okazon anonci la kandidatiĝon de Montrealo por okazigi la 104an UK tie en 2019.



Geoffrey Greatrex

Forfalintaj eroj, dekstre en p.17; kulpas Wordperfect:
Je la akceptejo de la 10a Kanada Kongreso de Esperanto en Toronto: Nicole Teasdale, sekretariino; G. Clavet, prezidantino de KEA; Francisko De Kinder, vicprezidanto de KEA

En 1968 Centra Insulo de Toronto ankaŭ altiris homojn por profiti la belan someran veteron: Frato Guy Parrot, J. Pochmursky, Kajmo Brent, Lilianne Laprise, Nicole Teasdale, M. J. Bellemare kaj G. Clavet.

# Krucvortenigmo: solvo

Don Reble

| | | | | | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Ĉ | A | M | B | R | | S | P | R | O | N | | K | A | D | U | K |
| E | G | A | L | U | | K | U | I | R | I | | A | K | I | R | I |
| F | I | N | O | S | | I | M | P | E | T | | R | U | L | I | S |
| A | T | I | K | O | | O | P | A | L | O | | A | Z | E | N | O |
| J | U | K | O | J | | J | U | R | O | J | | F | I | N | I | S |
| | | | | | | | | | | | | | | | | |
| R | A | C | I | A | | T | O | M | A | T | | G | L | A | S | O |
| E | F | E | K | T | | A | F | A | Z | I | | V | I | P | U | R |
| V | E | R | S | I | | S | T | R | O | F | | A | M | E | M | A |
| A | K | T | O | N | | K | A | K | T | O | | T | O | L | O | J |
| S | T | A | N | G | | U | N | I | O | N | | U | J | O | J | N |
| | | | | | | | | | | | | | | | | |
| S | A | K | A | S | | F | L | O | R | O | J | Ĝ | I | B | O | J |
| A | T | L | E | T | | L | I | B | E | R | | I | M | I | T | U |
| K | L | A | R | A | | A | T | E | N | D | | R | A | N | O | N |
| R | A | V | A | N | | G | R | O | T | O | | A | G | O | N | I |
| U | S | O | N | O | | R | O | S | O | N | | S | I | M | I | O |